

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 7 fkoj
Bonfara : 12 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

MAJO-JUNIO-JULIO-AŬGUSTO

1968 **3 - 4**

KULTURAJ KAJEROJ

1968 MAĴO-JUNIO - JULIO-AŬGUSTO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes

Komitatanoj :

Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

Pri Gresillon :
Naskiĝo de Esperanto-Domo.

Esperanto tra la mondo.

Superrigardo al
Hindio.

Rabelais kaj la Internacia lingvo E. Motillon

Top-Sekreto de la venenoj (2-a parto).

Ankaŭ la sciencistoj emas dubi R. Jacquesson.

Milan Rastislav Stefanik I. Slavik

Teatraĵo :
S-ro Badin Courteline
(tr. Beck kaj Jean)

Por via distro
Nia konkurso P. Chevalier

Gramatiko per bonhumoro

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

La redakcio de Kulturaj Kajeroj petas siajn legantojn senkulpigi ĝin pri la malfrua apero de tiu-ĉi numero de la revuo. La sociaj okazintaĵoj en Francio malebligis la redaktadon kaj la presadon en ĝusta tempo.

La venonta numero de Kulturaj Kajeroj (n. 5) aperos meze de Oktobro.

Pri Grésillon

La someraj periodoj anonciĝas sufiĉe bonaj. La nombro de la aliĝintoj estas la sama, kiel lastan jaron kaj ni esperas, ke el la multaj informpetintoj ankaŭ pluraj aliĝos. Tamen restas ankoraŭ kelkaj liberaj lokoj. Do, se vi ĝis nun ne faris decidon pri viaj ferioj tuj skribu por rezervi vian liton.

Suplemento de Kulturaj Kajeroj estis eldonita komence de majo. La titolo de tiu suplemento, en speciala alloga kovrilo desegnita de S-ino Lilli Giloteaux, elokvente malkaŝas ĝian enhavon : « Naskiĝo de Esperanto-Domo ». Jam de longe oni diversflanke petis precizajn informojn pri la kreado de nia Kulturdomo. S-ro Micard, kiu pli ŝatis rigardi antaŭen ol malantaŭen, posedis multajn dokumentojn, sed ne emis skribi pri tiu kreado, kiu estis lia. Antaŭ unu jaro la administantaro de la Esperantista Kulturdomo decidis aperigi broŝuron utiligantan tiujn dokumentojn por rakonti la diversajn paŝojn al la fondo de la societo « Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj », la traktadojn, kiuj ebligis la aĉeton de la kastelo Gresillon fare de tiu societo, kaj la unuajn jarojn de la vivo de la Esperanto-Domo.

La redakcio de Kulturaj Kajeroj opinias, ke eldonante tiun broŝuron ĝi ne nur omaĝis Henri Micard, sed ke ĝi ankaŭ helpis al la Esperantomovado per diskonigo de la kread-maniero de unu el la plej gravaj atingaĵoj.

NASKIĜO DE ESPERANTO-DOMO

16-paĝa broŝuro presita -- formato 21 x 27 -- multaj fotoj
Originala kovrilo de Lilli Giloteaux
Prezo : 3,50 f.f. aŭ 10 steloj

Esperanto tra la Mondo

57-a Universala Kongreso :

Ĉi okazos en Portland (Usono) de la 29-a de Julio ĝis la 5-a de Aŭgusto 1972. Favora prezo de vojaĝo per komforta aviadilo ; verŝajna prezo Amsterdam-Portland-Amsterdam : mapli ol 4.000 steloj. Se vi principe intencas partopreni anoncu vin provizore al UEA. Tio ankoraŭ ne ligos vin.

El UEA :

La gesamideanoj, kiuj okaze de vizito en Roterdamo, deziras viziti la Centran Oficejon de UEA kaj la domon de la Asocio prefere venu inter la 13-a kaj la 14-a horoj aŭ inter la 17-a kaj la 18-a.

Por la gejunuloj :

— Labortendaro por ne-esperantistaj gejunuloj okazos en Vaals (Nederlando) de la 14-a ĝis la 31-a de aŭgusto. Esperanto-kurso funkcios. Gvidantoj estas serĉataj (junulo kaj junulino 18 ĝis 35-jaraj) Restado senkosta, repago de almenaŭ parto de la vojaĝkostoj. Jeanne-Marie Liouville, 6, rue Léon-Vaudoyer, Paris 7e.

— Aix-en-Provence (Francio) 13-20 aŭgusto : Psikosociologia Seminario. Programo kaj kondiĉoj de restado : Studenta Esperanta Rondo, 28, rue Portalis, 13 - Aix-en-Provence.

El Hispaino :

La Hispanaj Fervojoj eldonis 40-paĝan libreton kun ilustraĵoj : « Vojaĝi tra Hispanio estas facile ». Petu la broŝuron : Ekscelensa Sinjoro Comisario de la Comisaria de Informacion y Relaciones Publicas de RENFE, Plaza Espana Torre de Madrid 2a Planta, Madrido (13), Hispanio.

El Jugoslavio :

La Internacia Festivalo de Poezio invitis ĉijare ankaŭ Esperanto poetojn, William Auld kaj Miyamoto Masao.

El Britio :

450 personoj partoprenis la Britan Kongreson de Esperanto en Universitato Manĉestro en lasta aprilo.

Esperanto en la lernejoj :

En sep urboj de Pollando Esperanto fariĝis deviga studobjekto. La Pola Ministro pri Edukado decidis, ke esperanto-kursoj en aŭ ekster la oficiala stud-hortabelo devos konformiĝi al reguloj starigitaj de la Esperanto-Asocio. Pollando staras nun sur la kvara vico de la landoj en kiuj Esperanto estas instruata en lernejoj, post Bulgario, Hungario kaj Francio.

Sindikatoj :

La Internacia Konfederacio de Liberaj Sindikatoj (53.400.000 membroj en 94 landoj) eldonos broŝuron pri si mem en esperanto.

Fiat :

Tiu firmo eldonis novan koloran filmon kun esperantoparolo. Adreso : Direzione Stampa e Propaganda, Corso Marconi 10, I - 10100 Torino, Italio.

Koresponda Servo :

La korespondemuloj sin turnu al : Koresponda Servo de U.E.A., 12, rue des Jacobins, 63 - Clermont-Ferrand, Francio.


Kelkaj el vi ankoraŭ ne pagis sian abonon por 1968.
Ankoraŭ ne tro malfrue estas, sed tamen...

TUJ REABONU

al poŝtĉekkonto :
P. BABIN, 13, bd. de la Chauvinière, Nantes-44 --- N° 281361 Nantes
aŭ al la peranto en via lando.

Superrigardo al

HINDIO




Sed Hindio estas vastega, preskaŭ kontinento. Pro tio, de la Nord-Orienta Himalajo ĝis la suda oceano, oni trovas la plej variajn klimatojn, la plej diversajn popolojn, la plej eksterordinarajn pejzaĝojn. En ĝi sama lando situas malvarmegaj montoj kaj ekvatoraj arbaroj. Pro tio Hindio estas turisma lando en ĉiuj sezonoj, ankaŭ dank'al modernaj hoteloj tre komfortaj.

Hindio estis la naskiĝloko de pluraj grandaj religioj aŭ akceptis alilandajn sektojn. Arto respegulas la fervoron de la popoloj. Apud Bombay ekzistas la du plej mondskale konataj grupoj de « grot-temploj », Ajanta kaj Ellora. Kelkaj estas pli ol 2.000-jaraj kaj iliaj skulptaĵoj kaj pentraĵoj konservis mirindan freŝecon.



Foririnte de Parizo tagmeze, vi alvenas en Delio la postan tagon frue matene... per aviadilo kompreneble. En tiu loko la vojaĝanto trovos du urbojn : la modernan, konstruitan de la Angloj en 1931, kun « viktoriaj » monumentoj, larĝaj avenuoj, kaj la antikvan urbon de la mongolaj imperiestroj. Rigardante la tombo-monumenton de la imperiestro Humayun, konstruitan meze de la 16-a jarcento, aŭ la Ruĝan Fuorton, oni komprenas la potencon de la estintaj dinastioj. Kaj kiam li eniras la fuorton la vizitanto miras pro la internaj gracio kaj riĉeco. Poeto diris pri tiu loko : « Se ekzistas paradizo sur la tero certe tie ĝi situas. »



Estas malfacile kompari tiun arton kun tiu de Bhubaneswar, Sude de Kalkuta, kaj ĉefe kun la unika Templo de Suno en Konarak. Ĉi estis konstruita en 1250 kaj elvokas la mistikan ĉaron de la suno traveturanta la ĉielon. La dekdu paroj de radoj kaj la sep ĉevaloj estas famaj sed ankaŭ ĉiu kvadrata metro montras mirindaĵojn.

Hindio estas grandega art-libro malfermita al la vizitanto.

RABELAIS

kaj la internacia lingvo

Antaŭ nelonge, aperis en tiu revuo, studo pri François Rabelais, verkita de nia amiko J.-P. Guillot. Ĝi montris la vastan klerecon de tiu geniulo, kreinto de la franca lingvo.

Pro lia universala kaj enciklopedia scio, la demando pri internacia lingvo certe sin prezentis antaŭ lia menso. Li ja neniam priparolis senvuale tiun temon. Sed, en lia verko, ni povas konstati priokupon pri la demando. Eĉ li esprimis kelkajn el la fundamentaj reguloj, kiujn D-ro Zamenhof aplikis tri jarcentojn poste.

Li tre klare evidentigis la eblan internaciecon de komuna vortaro. Oni eĉ povas diri, ke li kreis la unuan esperantan vorton iam prononcitan.

Pantagruel kaj liaj kunuloj faras longan vojaĝon por ricevi de la Sibilo Bakbuk la vorton, kiu estas la ŝlosilo de la saĝo. Post teruraj aŭ amuzaj aventuroj, ili fine alvenas en la subtera templo, kie regas la « pontifikino Bakbuk. « Tie, Panurgo aŭdos la misteran vorton de la « dia botelo ».

Strangaj ceremonioj kaj ritoj estas plenumitaj, kaj « Tial aŭdiĝis tiu vorto *Trink* ». Poste, la sibilo komentas la vorton tiel : « *Trink* estas orakol-plena vorto, famigita kaj konata de ĉiuj nacioj, kaj signifas : *Trinku*. Vi diras, en via mondo, ke *sako* estas vorto komuna en ĉiu lingvo, kaj prave, ĉar senerare komprenata de ĉiuj nacioj ».

Ĉu tio ne estas la esenco mem de la esperanta vortaro ? t.e. la pleja internacieco de la radikoj ?

(Kompreneble, tiu vorto « trink », ŝlosilo de la saĝo ne signifas simple : « trinku la sukon de l'vinberoj », sed trinku, asimilu tiun « kvintesencon » de la homaj konoj : Sciencon, kies serĉanto Rabelais proklamas, ke li estas).

La malmodestaj aŭtoroj de provaĵoj pri internacia lingvo bone farus legante la verkon de Rabelais. Tiuj fanatikuloj pri « naturalismo », kiuj riproĉas al Esperanto ĝian « nenaturecon » aŭ « artefaritecon » multe lernus meditante tiujn vertojn de la granda verkisto :

« Estas trompo diri, ke ni havas naturan lingvon ; la lingvoj ekzistas per arbitraj institucioj kaj popolaj oportunecoj ; la vortoj, kiel diras la dialektikistoj, ne nature signifas, sed laŭ volo. Mi ne diras tion sen kaŭzo ».

Efektive, la abundeco de lia vortaro estas sensimila. Nur, eble, la lingvaĵo de Victor Hugo povas esti komparata kun tiu de Rabelais, laŭ sia amplekso.

Kiuj estas la fontoj de tiu vortriĉeco ? La verkisto ĉerpis plenmane en la populara lingvo, uzante eĉ arkaismojn. Kaj lia enciklopedia scio provizis lin per multaj metiaj kaj teknikaj terminoj.

Precipe, li estis virtuozo de la vortfarado. Li uzadis afiksojn kun nekomparebla mastreco ; kunmetis radikojn, el prepozicioj faris precizigajn afiksojn. Per latinaj kaj grekaj radikoj, li formis novajn sencoriĉajn vortojn. Kompilintoj faris longajn listojn de tiuj vortoj, ankoraŭ vivantaj, kreitaj de la genia verkisto.

Ni do vidas, ke li jam ellaboris la metodon uzitan de Zamenhof por la esperanta vortfarado. Same kiel la rabeleza lingvaĵo, fonto de la nuna franca lingvo, Esperanto ŝuldas sian riĉecon je tiu ebleco krei la bezonatan esprimilon per kunmetado de radikoj (afiksoj estas fakte memstaraj radikoj) kaj de la diversaj lingveroj : prepozicioj, adverboj ; kaj ankaŭ, kiam necese per neologismoj prudente elektitaj.

Pro la granda disvastiĝo de la franca lingvo, multaj el la vortoj kreitaj de Rabelais fariĝis internaciaj, plej bona pruvo pri iliaj neceseco kaj taŭgeco. En Esperanto, troviĝas multaj el tiuj vortoj kreitaj de la franca verkisto. Ĉi sube, mi citos kelkajn. Tiu listeto — tiom nekompleta ĝi estu — sufiĉos por montri kiom la tuthoma kulturo, kaj ni esperantistoj, ŝuldas al la genio de Rabelais :

asbesto, baldakeno, banko, gondolo, mato, apatio, makrokosmo kaj mikrokosmo, filologo, simpatio, zoofito, kaj multaj aliaj.

Kurioza afero : la unua vorto citita malaperis de la franca lingvo, sed daŭre vivas en la internacia lingvo ; la francoj ne plu diras « asbesto », sed « amiante ».

La genio de Rabelais estas tiom ampleksa, tiom multforma, ke malgraŭ longaj kaj kleraj studoj, oni ne jam sukcesis elmontri ĉiujn ĝiajn facetojn. La celo de tiu modesta studeto estas nur riveli al niaj samideanoj unu nekonatan kaj interesan aspekton de tiu unika viro.

E. MOTILLON.

TOP-SEKRETO DE LA VENENOJ

(2-a parto)

La aranidoj montras grandan diversecon : inter ili la araneoj estas la plej interesa grupo. Kurioza estas la fakto, ne sufiĉe konata, ke la plej danĝera specio vivas en Francujo. Ni parolas pri la « malmignato » el la familio de la « Nigra Vidvino » ; ĝi vivas en Korsikujo. Kvankam ne ĉiufoje nepre mortiga, ĝi, kiel la vera « Nigra Vidvino » estas danĝera kaj timinda. Ja, estas la piko de la femalo, kiu plej gravas ; la masklo estas 2-foje pli malgranda kaj fakte sendanĝera.


13 ruĝajn makulojn portas la « malmignato » dum la amerika « Nigra Vidvino » havas nur unu ruĝan makulon sur brile nigra korpo, similanta botetobutonon ; kutime la « Nigra Vidvino » estas malgranda ; la diametro de ĝia abdomeno apenaŭ superas unu centimetron. Inter ĉiuj araneoj, nur ĝi estas mortiga por la homo. Longtempe ĝia veneno estis mistero ; oni nur sciis, ke la veneno de unu sola « Nigra Vidvino » povis mortigi milon da katoj. Hodiaŭ, oni malkovris, ke ĝi entenas kelkajn komponantojn, inter kiuj nur unu proteineca elemento estas mortiga por la mamuloj.

Koncerne la aliajn araneojn, fakte ĉiuj estas venenaj ; tamen nur la tre dikaj (tarentulo, migalo), kvankam ne fatalaj sed tre danĝeraj, estas nepre evitendaj : ilia piko okazigas febron kaj seriozajn komplikaĵojn (ne bone sciate ĉu pro la veneno, ĉu pro la bakterioj transportitaj sur la kroĉiloj de la araneoj). Ekzemple : la piko de la bruna « solulino » en la unua momento ŝajnas tute ne grava. Nur post kelkaj horoj, komenciĝos la enuoj : febro, intensa doloro, kramfoj, naŭzoj. Plue la eteta vundo, farita de la kroĉiloj, rapide gangreniĝas kaj obstine rifuzas resaniĝi ; la ulcero pli kaj pli enprofundiĝas kaj estas necese eltranĉi la tutan vunditaĵon, kio formas truon (kaj laboron por la estetika kirurgio). Ni diru ankoraŭ, ke la « solulino » preferas freŝajn lokojn : banĉambrojn, necesejojn, litaĵojn k.t.p. La civilizacio alportis al ĝi novan kaŝejon : sub la kuvetokovrilo de la necesejoj ; facile oni imagas, kie ĝi pikas la neatentulojn.

Nenia insekto vere estas danĝera por la homo, sed same kiel por la araneoj, nur la propra reago al veneno de la persono kaj ties fizika rezistemo gravas aŭ ne . Krabro estas la plej virulenta : se multaj atakas iun, la rezulto povas esti fatala — same por abelsvarmo.

La plejparto el la venenoj (el serpentoj, skolopendroj, araneoj, skorpioj, aŭ vespoj) entenas 2 toksajn principojn, kiuj proporcie varias laŭ la veneno.

1) Unu neŭrotoksino, kiu (kiam ĝi precipas, ekz. ĉe la kobroj, kaj minut-serpentoj) atakas la nervan sistemon kaj okazigas paralizon kaj morton. Tiu neŭrotoksino estas la plej danĝera, ĉar ĝia ago estas ege rapida kaj ne lasas sufiĉe da tempo por interveni. Tamen, se la viktimo konservas la vivon, ĝi rapide resaniĝas.



2) Unu hemoragiigo, kiu (kiam ĝi precipas, ekz. ĉe sonserpentoj, komunaj viperoj en Francujo) atakas la sangan sistemon, solvas la ruĝajn globetojn kaj koaguligas la sangon ; ĝia ago estas malrapida, sen vera efiko sur la nervoj ; sed la hemoragiigo ege malpliigas la normalan rezistemon de la sango kontraŭ la bakteriaj infektoj ; gangreno instaliĝas kaj morto povas okazi.

Konforme al ĝenerala regulo de la Naturo, la venenaj bestoj estas imunigitaj kontraŭ sia propra veneno (sed ne devige kontraŭ tiu de la aliaj specioj) : la rakonto pri memmortigo de skorpio, sin pikante, estas nur legendo.

Ne nur teraj bestoj ricevis venenan pikilon sed ankaŭ tre multnombraj specioj de fiŝoj — tre danĝeraj.

La murenoj, similaj je serpentoj, okazigas danĝerajn, mordojn. La trakinoj kaj rajoj havas venenan pikilon. La plej danĝeraj : la « sinankeoj » vivas en varmaj maroj de Aŭstralio kaj Nov-Kaledonio ; ili similas malnovajn ŝtonojn — impregnitajn de ŝlimo, fakte nevideblajn sur la rokaj fundoj, tute senmovajn, eĉ se oni provas ilin deloki ; sed, sur ili ne marŝu ; ilia korpo estas hirtita de

venenaj dornoj : tiu veneno okazigas netolereblajn dolorojn kun multaj nervaj perturboj.

La plejmulto el la meduzoj estas venenaj, plejbone ili estas urtikecaj, plejmalbone, tiel timindaj kiel la minut-serpentoj. Same por la hidroj, maranemonoj kaj aliaj moluskoj kun filamentoj. Inter la plej konataj meduzoj estas la « fizalioj », kiuj, dum momento, invadis la hispanajn marbordojn.

Ankoraŭ en la varmaj maroj, precipe en la ĉirkaŭaĵo de Aŭstralio, oni renkontas meduzon responsan je multaj mortoj. Ekz. : en Cairns naĝanto vagis apud marbordo, subite la spektantoj aŭdis lin krii kaj vidis lin, ŝanceliĝante eliri el la akvo ; fajnaj tentakloj kovris liajn gambojn, liajn krurojn kaj lian korpon. Hororitaj liaj amikoj ĉeestis senpovaj liajn konvulsiojn ; 3 minutojn poste li estis mortinta.

La fiŝoj, malsame de la aliaj bestoj havas nek pikilon nek venen-glandon. La tuto de la fiŝo aŭ kelkaj partoj estas impregnitaj de toksino, kies efiko estas fulmorapida. Kontraŭparte la besto fariĝas mortiga, nur kiam oni ĝin mangas... kion oni povas ĉiam eviti ; sed vidu : la fiŝo la plej venena, la « tetraodono » — aŭ « fugu » — estas tiel bongusta kaj havas tiel delikatan viandon, ke la Japanoj sin riskas ĝin manĝi ; principe, ĝia preparado estas permesata nur en specialaj restoracioj, al kuiristoj diplomitaj de la Ministerio por Publika Higieno ». Tiu « fugu » ankaŭ konata sub la nomo de luno-fiŝo aŭ pilko-fiŝo, kvankam nekontesteble la plej venena el la fiŝoj, vivas en varmaj maroj, kaj abunde fiŝkaptita kontribuas al la nutrado de la Japanoj. Ĝia tokseco, de jarcentoj konata de indiĝenoj, estis novaĵo por la konkerantoj de la malnova tempo. R.P. Saverio Clavigero rakontas, ke, en 1706 « 4 soldatoj trovis fajron, sur kiu indiĝenaj fiŝkaptistoj estis, iom antaŭe, rostintaj kelkajn tetraodonojn, zorge formetintaj la toksajn hepatojn sur konkojn. Spite la energiajn avertojn de la indiĝenoj, unu soldato komencis manĝi tiun hepataĵon ; li mortis post duonhoro ; la dua soldato nur maĉis ĝin : ĝi mortis iom pli poste ; la tria soldato nur tuŝis ĝin : li restis senkonscia ĝis la morgaŭo ».


Nur la plej ĵusaj rimedoj permesis izoli la venenaĵojn entenatajn en tiu fiŝo (precipe en haŭto, hepato kaj generiloj). Dank'al kromatografioj sur diversaj sorbantoj, la Japanoj Tsuda kaj Kawamura sukcesis obteni la toksinon absolutan kaj prismoforme kristaligitan, nomitan tetrodotoksino — el la konataj venenoj la plej efika kaj fulmorapida — mortiga je la dozo 10 milonoj da gramoj por 1 kilogramo da viktimo.

Kurioza kaj rara estas en la Naturo la fakto, ke post studoj de absoluta embriologio, tute sendependa de tiuj faritaj sur la fuguoj oni en 1964, malkovris en malgranda batrako, la trito de Kalifornio, toksinon (unue nomitan tarikatoksino) tute similan al la tetradotoksino de la fuguoj. Pro tiu identeco, ambaŭ ricevis la saman nomon : tetradotoksino.

La absoluta trito-toksino ĉeestas en la ovoj kaj embrionoj ; jen pri ĝia mikroskopa kvanto : grapolo da ovoj proksimume enhavas 20 embrionojn kaj pezas 7-8 gramojn ; do 100 kilogramoj da ovoj proksimume egalas 13.000 grapolojn, do pli ol 250.000 ovojn. Nu, tiuj 250.000 ovoj donas nur 33 centigramojn da absoluta toksino.

La malkovro de la saksitoksino estas ankoraŭ pli freŝdata, kvankam ĝia efiko estas konata de longtempe ; temas pri venenado fare de konkaĵoj perfekte freŝaj kaj sanaj. Oni konstatis, ke la konkaĵo per si mem estas tute senkulpa, sed ĝi retenas sekrecion de ia marplanktono : la « dinoflageloj », vivantaj elementoj, mezvoje inter besta kaj vegetala mondoj.

Tiuj elementoj okazigas tion, kion oni nomas rugan maron aŭ ruĝan tajdon : je ilia kontakto la tuta kutima faŭno mortas ; nur rezistas konkaĵoj, polpoj, asterioj, moluskoj. La virulenteco de tiu saksitoksino estas ankoraŭ supera al tiu de la tetrodotoksino.



Saksitoksino kaj tetrotoksino same atakas nervan sistemon kaj okazigas paralizon.

Industria sinteza preparado de tiuj toksinoj hodiaŭ mobilizas milojn da serĉistoj. Krom terapeŭtikaj celoj (anesteziloj, sendolorigoj, emetikoj) kaj do homfavoraj, profiliĝas celoj multe malpli noblaj, pri kiuj ni jam parolis : la militistoj opinias, ke ili trovis tie unuagradajn « malkapablumojn » ...estas, kompreneble nur eŭfemismo.

Cetere oni devas ne forgesi, ke la serĉoj pliiĝos : la toksinoj sekreciataj de la bakterioj, la « botulika » bacilo aŭ la tetana bacilo fatale agas je dozoj ankoraŭ centmilfoje pli malgrandaj ol la tetrodotoksino. Verdire, temas pri proteinecaj toksinoj, kiujn nuntempe oni ne scias sintezi. Sed kio estos morgaŭ pri tio ?

Bela militista kariero hodiaŭ malfermiĝas al tiuj, kiuj studas bakteriojn, mikrobojn, venenojn, toksinojn kaj aliajn mikroskopajn iojn : Varbiĝu ! revarbiĝu en la biokemion !


(El artikolo de R. de la Taille).

Ankaŭ la sciencistoj emas dubi

Oni bone scias ke, kontraŭ ĉiu filozofia, sociologia, literatura, politika tezo, ĉiam estas eble kontraŭmeti argumentojn aŭ eĉ tezojn tute valorajn, kaj ke la interdiskutoj povas daŭri tre longe. La fakto, kiu decidus favore al unu el la partoprenantoj malofte ekzistas, kaj se ĝi ekzistas, ĝi estas malsame komprenata de ĉiu el ili favore al si-mem.

Multaj personoj tiam opinias, ke la sciencistoj, kiuj konstante laboras inter naturaj fenomenoj aŭ eksperimentaj faktoj, estas ŝirmitaj kontraŭ tiaj necertecoj, kaj ke tial ili certe estas mense feliĉaj homoj.

Tamen, multaj aŭtoritatuloj substrekis en la lastaj jaroj la konstantan dubon de tiuj sciencistoj, dubo kiu retroviĝas en la maniero instrui la sciencojn, eĉ tiujn



Kiel oni « vidis » la hidrogenan atomon antaŭ kelkaj dekoj la jaroj.

laŭdire ekzaktajn, en la instruprogramoj, kaj fine en la sindeteno de la junaj studentoj.

Certe ekzistas matematikistoj, kiuj longe diskutas pri la nombro nulo aŭ pri la nombro unu. Tio estas nur malofta kazo.

Oni povas malkontesti ke 2 kaj 2 faras 4, ke la varmigado de elektra fadeno dependas de la elektra kurento laŭ certa formulo, ke la leĝo de Newton kiu estras la movojn de la astroj kaj satelitoj estas absolute certa, kiel montras la grandega precizeco de la ĉiela mekaniko aŭ de la kalkuloj pri la trajektorioj de la artefaritaj satelitoj.

Oni ne vidas, kiaj timoj povus naskiĝi pri tiuj faktoj, nek kiaj modifoj estus necesaj en la naturo de ilia instruo.

Tamen, la aŭtoritatuloj pri kiu ni parolas diras, ke la instruado de la scienco povas esti ĝis funde ŝanĝita en la 10 proksimaj jaroj : la sciencistoj estas do dubemaj.

Por konvinkiĝi pri tio, sufiĉas rigardi malantaŭen, la evoluadon de la sciencaj konceptoj. Ni prenu, ekzemple, tiun de la materia strukturo.

Dum jarcentoj, ĉefe kiam la alkemio regis, la plej eminentaj sciencistoj kredis ke oni povas eltiri oron el plej diversaj materialoj, kaj eĉ el urino, precipe, kiam ĝi estas flava. Tiuj kredoj kaj la instruoj kiuj rezultis, daŭris ĝis Lavoisier (1787) kiu, kiel estas bone konata, montris pere de pesilo, ke difinita materialo, kiel ekzemple la fero, eterne restos, laŭ naturo kaj maso, fero. Ne ekzistas nun en la universo I mg da fero pli aŭ malpli ol ekzistis, kiam ĝi formiĝis : « Nenio kreiĝas ».

La fizikistoj kaj la kemiistoj poste montris, sin apogante sur tiu tezo, ke materialo ne estas senfine dividebla, t.-e. ke oni ne povas fari el ĝi pecojn tiel malgrandajn, kiel oni dezirus, sed ke oni devas halti ĉe eroj, nomitaj atomoj, kiujn oni ne povas dividi sen profunda ŝanĝo de ilia naturo. El tiuj atomoj, kaj iliaj kombinaĵoj en konstantaj proporcioj, konsistas ĉiuj naturaj kaj artefaritaj korpoj.

La atomo estas do ne dividebla kaj eterna.


Tiu ideo, tre fruktodona ĉar la tuta kemio estas konstruita sur ĝi, estis konsiderata, kiel vera dum unu jarcento proksimume, 10 foje malpli longe ol la ideoj de la alkemiistoj.

Je la fino de la 19a jarcento kaj komenco de la 20a, estis necese profunde modifi la ideojn de Lavoisier post tre gravaj eltrovoj. Tio ne signifas, ke tiuj ideoj ne estis ekzaktaj, sed ili spegulis nur tre simplecan aspekton de la realeco.

Ĉirkaŭ 1890, oni eltrovis, ke elektra sparko en maldensaj gasoj kapablas dividi la atomojn en eroj elektre ŝarĝitaj kun kontraŭaj signoj.

Ekzemple la hidrogena atomo — la plej malpeza kaj la plej simpla el ĉiuj atomoj — dividiĝas en I pozitiva kaj I negativa eroj.

Oni trovis, ke la ecoj de la negativaj ŝarĝoj liberigitaj de la elektra sparko estus bone klarigitaj se oni



Kiel oni « vidas » diversajn energiajn statojn de la hidrogena atomo nuntempe.

supozus ke ili konsistas el negativaj elektroeroj ĉiuj similaj kun samaj elektroŝarĝo kaj maso, sed sen materia aspekto. Ili konstituas la katodajn radiojn kiam ili estas movigitaj, kiel okazas en la sparkotubo. La maso estas tre malgranda : 2000 foje pli malgranda ol tiu de la atomo.

Rilate la pozitivan parton, ĝi transportas preskaŭ la tutan hidrogenan materion, kaj efektive redonas la hidrogenan atomon tuj kiam ĝi reprenas la negativan parton forigitan de la elektra sparko.

Oni nomas la negativan parton, elektronon, kaj la pozitivan, hidrogenan jonon aŭ protonon. En aliaj gasoj la sparko donas ĉiam elektronojn, kiuj do aspektas kiel universala konstituaĵo de la materio, kaj jonojn kiuj havas malsamajn masojn laŭ la studata gaso. Tiuj jonoj facile redonas la atomojn el kiuj ili venas, ili do konservas la proprajn karakterojn de la kemia speco.

Por klarigi ke, en la atomoj, la negativaj elektronoj ne sin ĵetas sur la pozitivan parton, Rutherford imagis en 1911 skemon de atomo en kiu la elektronoj turniĝus ĉirkaŭ centra pozitiva nukleo, kiu entenas preskaŭ la tutan mason de la atomo. En la hidrogena atomo, la ununura elektrono turniĝus ĉirkaŭ la nukleo kiel la luno ĉirkaŭ la tero, la elektraj altiraj fortoj rolante kiel la gravitaj altiraj fortoj.

La mekanikaj leĝoj permesis la kalkuladon de la trajektoroj. Tiuj atomoj de Rutherford similis malgrandajn sunsistemojn en kiuj iu pli granda estas la nombro de la sateligitaj elektronoj des pli granda estas la maso de la atomo.

En la oro-atomo ekzemple, la nukleo estas 197 foje pli peza ol tiu de la hidrogeno, kaj 79 elektronoj turniĝas ĉirkaŭ ĝi, laŭ tre difinita maniero. Ĉirkaŭ 1920 aperis en la libroj bildoj de tiuj trajektorioj. Oni facile komprenas ke ili estis tre konfuzaj por la pezaj atomoj. Kaj se oni pensas ke necesas 100 milionoj da atomoj unu post la alia por fari longecon de 1 cm oni povas vidi je kia malgrandeco evoluas tiu sunsistemo. Necesas substreki ke tiu ideo permesis la klarigadon kaj kalkuladon de optikaj, magnetaj, aŭ elektraj ecoj de la atomoj dank'al aliaj teorioj pri kiuj ni eble havos la okazon paroli.


Prof. R. JACQUESSON.

Milan Rastislav Štefánik

(1880-1919)

Okaze de la kvindeka datreveno de fondiĝo de la Ĉehoslovaka respubliko (28 de oktobro 1918) rememoras la Slovakoj pri unu el la plej grandaj filoj de sia gento, sciencisto kaj batalanto por liberigo de la Slovakoj kaj Ĉeĥoj, generalo doktoro M. R. Ŝtefanik.

Li naskiĝis en malriĉa slovaka familio. Post gimnaziaj studoj li transiris al la Karlo-Universitato en Praha, kie li atingis la titolon de doktoro de filozofio. Jam kiel studento li havis nekutiman rilaton al sciencoj, precipe al la astronomio. Li senlace



La monumento de Stefanik sur la monto Bradlo-Slovakujo.

studis sciencliteraturon astronomian kaj malgraŭ siaj malriĉaj rimedoj li vizitis observatoriojn en Zürich, Geneve kaj Milano.

En la jaro 1904 fininte la Universitaton forveturis Ŝtefanik en Parizon, kie li fariĝis lernanto de mondfama sciencisto Pierre J.C. Janssen (1824-1907) en la observatoro Meudon. Kun Janssen veturis Ŝtefanik en Hispanujon kun celo observadi la Sunon. Li laboris ankaŭ en la novkonstruita observatorio sur Mont Blanc, kies kunlaboranto kaj kunfondinto li estis. Por observado de la Suno proponis kaj realigis Ŝtefanik novan konstrukcion de spektroheliografo, kiu en la praktiko plene sukcesis kaj estas uzata ĝis hodiaŭ. En la jaro 1906 veturis li al Turkestano (Azio) por observi eklipson de la Suno. Ĉi tiun ekspedicion rekomendis al Ŝtefanik la franca scienca instituto « Bureau des Longitudes ». Unu jaron pli poste estis Ŝtefanik honorigita per la premio de Janssen kaj la premio de la Franca Akademio de Sciencoj. En la jaro 1909 li veturis al Sahara okaze de nova astronomia ekspedicio. En printempo de la jaro 1910 ricevis Ŝtefanik la taskon veturi al Tahiti, kie krom la kutimaj astronomiaj observadoj li devis esplori la kondiĉojn por fondo de radiotelegrafia konekso inter Eŭropo kaj Oceanio. Estante tie Ŝtefanik observis la famaN kometon de Halley kaj eklipson de la Suno. Eminentaj rezultoj de liaj observadoj vekis intereson kaj simpatiojn de la mondkonata sciencisto Poincaré. El Oceanio revenis Ŝtefanik en Francujon somere de la jaro 1911, kaj tuj post la reveno li gvidis francan siencistan ekspedicion al Suda Ameriko. En la urbo Quito (Ecuador), kiu havis bonegajn kondiĉojn por la fondo de observatorio, proponis Ŝtefanik projekton de organizo de la scienca, precipe astronomia esplorlaboro. El Ecuador forveturis la ekspedicio kun similaj taskoj al la insularo Galapagos.

Ŝtefanik neniam forgesis pri sia patrujo kaj estis kun Slovakujo (tiam ankoraŭ parto de Aŭstria-Hungaria monarkio) en daŭraj skribaj rilatoj. Kvankam la laboro de sciencisto plene okupis kaj altiris lin, kiam en la jaro 1914 ekbrulis la unua mondmilito, lian sciencan laboron anstataŭis la laboro en la kadro de la franca armeo por liberigo de Slovakoj, por fondo de la Ĉeĥoslovaka respubliko. Li fariĝis aviadisto, organizis fremdlandajn libervolulojn, batalis sur la francaj batalkampoj kaj en la franca armeo li atingis la rangon de generalo.

Post la fino de la mondmilito en la jaro 1918 estis Ŝtefanik nomumita en sia nova liberigita patrujo ministron de la armeo. Sed li ne atingis la fruktojn de sia laboro ; revenante hejmen en malgranda triplaca aeroplano, en kiun sidiĝi signifis jam pruvon de nemezurebla kuraĝo, li falis sur la limoj de sia naskiĝlando proksime de la urbo Bratislava la 4-an de majo 1919. Li mortis kiel la biblia Mojzeso sur la sojlo de la promesita tero kaj en la plena floro de siaj kreofortoj, kiam lin lia liberigita sed malriĉa kaj neglektita popolo plej bezonis.

Ŝtefanik akiris internacian agnoskon pro sia scienclaboro kaj dankemon de sia popolo pro la diberigbatalo. Lia patrujo konstruigis al li grandan tumulmonumenton sur la monto Bradlo ĉe lia naskiĝvilaĝo. Sed ankoraŭ pli grandan kaj pli valoran monumenton kreas al li lia nacio kaj la tuta homaro per plenumado de lia devizo : Kredi, Ami, Labori !

I. SLAVIK.

TEATRAĴO

Sinjoro BADIN

de Georges Courteline

(Sceno el la skriboficeja vivado)

« Direktora skribôcambro — La Direktoro, sidante ĉe sia skribotablo, faras subskribojn, kiujn li tuj sorbigas. Subite li ĉesas sian laboron kaj direktas manon al ŝnuro de sonorileto. Oni aŭdas sonorigon en la kuliso. La pordo malfermiĝas. Aperas oficeja servisto ».

La Direktoro. — Ĉu vi, Ovid ?

Ovid. — Jes, Sinjor' Direktoro.

La Direktoro. — Ĉu Sinjoro Badin estas alveninta ?

Ovid. — Jes, Sinjor' Direktoro.

La Direktoro (mirigita). — Sinjoro Badin estas tie ĉi !

Ovid. — Certe.

La Direktoro. — Pripensu bone tion, kion vi diras. Mi demandas vin : ĉu Sinjoro Badin, kopiisto en la tria oficejo, sidas ĉe sia ofica loko, aŭ ne ?

Ovid. — Sinjor' Direktoro, tie li estas.

La Direktoro (suspekteme). — Ovid, vi drinkis.

Ovid. — Mi !

La Direktoro. — Nu ! konfesu la veron, mi tiufoje ne riproĉos vin.

Ovid. — Sinjor' Direktoro, mi ĵuras, mi nur trinkis glason da gliciriza akvo.

La Direktoro (al si mem). — La ĉeesto de Sinjoro Badin en la ministrejo estas tia fenomeno, tia anomalio ! Fine, mi tuj bone scios (laŭte). Venigu Sinjoron Badin.

Ovid. — Bone, Sinjor' Direktoro.

Li eliras. La Direktoro daŭrigas sian laboron. Silentado. Fine, oni aŭdas ĉe la pordo tri frapetojn.

La Direktoro. — Eniru ! (Aperas Sinjoro Badin).

Sinjoro Badin (li salutas kliniĝante ĝis tero). — Sinjor' Direktoro.

La Direktoro (ĉiam skribante). — Bonan tagon Sinjoro Badin. Eniru kaj sidiĝu, mi petas.

S-ro Badin. — Mi estas dankega.

La Direktoro. — Neniel, neniel. Diru al mi, Sinjoro Badin. De preskaŭ dekkvin tagoj vi ne venis en la ministrejon.

S-ro Badin (humile). — Ne parolu al mi pri tio !

La Direktoro. — Permesu ! Precize por paroli al vi pri tio, mi petis ke vi venu en mian skribôcambron. Do, mi diras, de preskaŭ dekkvin tagoj vi ne venis en la ministrejon. Tion al mi sciigis via oficejestro ; kaj, ĉar mi estis maltrankvila pri via farto, mi sendis sesfoje al via loĝejo la ministrejan kuraciston. Sesfoje oni respondis al li, ke vi estas en la biervendejo.

S-ro Badin. — Sinjoro, oni mensogis. La pordisto estas fripono, kiun mi forpeligos de la luiganto.

La Direktoro. — Tre bone, Sinjoro Badin, tre bone, ne tiel koleru.

S-ro Badin. — Sinjoro, mi tuj klarigos al vi. Mi estas tenita hejme de familiaj aferoj. Mortis mia bofrato...

La Direktoro. — Ankoraŭ !

S-ro Badin. — Sinjoro !

La Direktoro. — Ha ! Sinjoro Badin, ĉu vi mokas min ?

S-ro Badin. — Mi !...

La Direktoro. — Jus mortis via bofrato, kiel same antaŭ tri semajnoj mortis via onklino, kiel mortis via onklo la lastan monaton, via patro je la Triunuo, via patrino je Pasko !... Nekalkulante, kompreneble, ĉiujn kuzojn, kuzinojn kaj aliajn parencojn, kiujn vi ne ĉesis enterigi po

unu almenaŭ ĉiusemajne ! Kia mortigado, ho, ja, kia mortigado ! Ĉu oni povas imagi similan buĉadon ?... Kaj mi nun parolas, nek pri la plej juna fratino kiu edziniĝas du fojojn jare, nek pri la unuanaskita, kiu akuŝiĝas ĉiutrimonate. Nu ! Sinjoro, sufiĉas. Ke vi moku la homojn, mi akceptas ! Sed finon havas ĉio ; kaj se vi kredas ke la Registaro al vi pagas dumilkvarcent frankojn ĉiujare, por ke vi pasigu vian tempon ĉu edzigante, ĉu enterigante, ĉu baptigante, vi tute eraras.

S-ro Badin. — Sinjor' Direktoro.

La Direktoro. — Silentu ! Vi parolos, kiam mi estos fininta ! Estas tie ĉi tri oficistoj, kiuj skribas kopiaĵojn : vi, Sro Supo, kaj Sro Ferlado. Sro Supo laboras en la oficejo de trideksep jaroj, kaj nun oni povas atendi de li nur signojn de lia vana bonvolo. Pri Sro Ferlado, estas tre simple : li vendas oleojn ekster Parizo ! Tiam, kion fari ? Jen tamen nia stato, kaj nekredeble estas ke, el tri kopiistoj, la unua estas duone malsaĝulo, la dua komerca makleristo, kaj la tria ĉeestas enterigojn, de la unua tago de l'jaro ĝis la festo de Sankta Silvestro ! Kaj naive vi kredis, ke tio povas tiele daŭri ? Ne, Sinjoro Badin, centfoje ne ! Mi estas lacigita de enterigoj, edziĝoj, kaj baptoj ! De nun, elektu : la ĉeestadon aŭ la eksiĝon. Elektu ! Se la eksiĝon, mi ĝin akceptas, mi ĝin tuj akceptas. Ĉu tio estas klara ? Se, kontraŭe, la ĉeestadon, vi faros al mi la plezuron alveni ĉiutage en la oficejon je l'tagmeze precizege... kaj tio tuj morgaŭ. Ĉu estas klare ? Mi aldonas, ke, kiam la fataleco (tiu malaminda fataleco, kiu persekutas vin kaj ŝajnas amuziĝis turmentegante vin) kontraŭstaros denove viajn familiajn amojn, mi vin forpelos ! Ĉu klara ?

S-ro Badin. — Ha ! vi multege ĉagrenas min, Sro Direktoro. Laŭ via parolmaniero, mi bone vidas ke vi ne estas kontenta.

La Direktoro. — Ne, vi eraras, mi estas kontraŭe tre kontenta.

S-ro Badin. — Vi mokegas min.

La Direktoro. — Mi ! Sinjoro Badin... Mi havus tiel perfidan animon ! tiel malamindan intencon !

S-ro Badin. — Jes, Sinjoro ; vi mokegas min, vi estas simila al tiuj malsprituloj, kiuj ŝerce batetas mian ventron kaj nomas min « pulĉinela oficisto ». Pulĉinela ! Dio antaŭgardu vin, Sinjoro, ke vi, nur dum kvaronhoro, vivu mian vivon de pulĉinela oficisto.

La Direktoro (mirigita). — Kial ?

S-ro Badin. — Aŭskultu, Sinjoro. Ĉu vi iam pripensis la sorton de l'malfeliĉa oficisto, kiu obstine, sisteme, ne volas aliri la oficejon, kaj kiun la timo de l'eksigo vizitadas, persekutas, turmentas, turmentegas dum la tuta tago.

La Direktoro. — Vere ne.

S-ro Badin. — Nu, Sinjoro, tio estas terura afero, kaj tamen jen estas mia vivo. Ĉiumatene mi riproĉas min ; mi diras al mi : « Badin, iru en la oficejon ; de ok tagoj vi ne tien iris ! ».Tiam mi vestiĝas kaj foriras ; mi aliras al la oficejo. Sed ho ve ! Sur la vojo mi eniras biervendejon, mi trinkas unu glason da biero, du... tri glasojn ! Mi rigardas la horloĝon kaj pensas : « Kiam ĝi montros la ĝustan horon, mi iros al la ministrejo ». Bedaŭrinde, kiam ĝi montris la kvaronon, mi atendas ke ĝi montros la duonon !

La Direktoro. — Kiam ĝi montris la duonon, vi ankoraŭ tie restas unu plian kvaronon.

S-ro Badin. — Perfekte ! Poste mi diras al mi : « Estas tro malfrue. Ŝajnus, ke mi mokas la homojn. Mi aliafoje iros ! ...Kia vivado ! Kia vivado ! Mi, kiu havis tre bonan stomakon, tre bonan dormadon, tre bonan gajecon, ne plus konas la plezuron ; mia nutrado ŝajnas al mi tiel acida kiel galo ! Kiam mi eliras, mi laŭiras la murojn, simila al fripono, al spionulo, mi senĉese timas la renkonton de unu el miaj estroj ! Kiam mi reeniras mi pensas vidi ĉe la pordisto eksigan dekreton. Ĉiam timante la forpelon, mi vivas tiel kvieta kiel kondamnito, kiu la ekzekuton atendas... Ha ! Dio !

La Direktoro. — Unu demandon, Sinjoro Badin, ĉu vi serioze parolas ?

Sinjoro Badin. — Mia koro neniel emas al ŝercado ! Pripensu do, Sinjor' Direktoro. La ducent frankoj, kiujn ĉiumonate oni tie ĉi al mi donas, estas ĉio, kion mi posedas. Kiel mi vivus, se ilin oni ne plu donus al mi ? Ĉar mi havas nenian iluzion : mi estas tridek-kvin jara, kaj, kiam malfeliĉulo, atinginta tiun teruran aĝon, forlasas sian laborilon, li ne plu povas esperi retrovi alian ! Jes, tio ne estas gaja, certe ! Tial mi plimalgrasiĝis, turmentiĝas ! Sinjoro, mi plimalgrasiĝis po dudek funtoj de kiam **mi estas neniam** en la ministrejo !

(Li refaldas la malsupron de sia pantalono) Rigardu miajn tibikarnojn, ĉu ili ne similas kandelojn ? Kaj se vi povus vidi mian lumbon ! ĝi ŝajnas lumbo de senhaŭtigita kato ; estas plorinde. Nu, sinjoro (inter viroj, mi povas tion diri) hodiaŭ matene, mi rigardadis scieme mian postaĵon per spegulo. Nu ! — mi estas ree malsana, kiam tion mi memoras — kia vidaĵo ! Estas malgrasa postaĵeto, apenaŭ tiel dika kiel la du pugnoj ! Mi ne plu havas « postvangojn » ; ilin fluidigis sendube ĉagreno, senĉesaj timoj, timegadoj. Plie mi, nokte, tusas, ŝvitegadas, leviĝas kvin aŭ sesfoje por trinki akvon ! (skuante la kapon) Ho ! tio finiĝos malbone.

La Direktoro (kortuŝanta). — Nu, ĉeestu en la oficejo, Sinjoro Badin.

S-ro Badin. — Ne eble ! Sinjor' Direktoro.

La Direktoro. — Kial ?

S-ro Badin. — Mi ne povas ...Tio enuigas min.

La Direktoro. — Se ĉiuj viaj kolegoj same parolus...

S-ro Badin (iom akra). — Mi rimarkigos vin, Sinjor' Direktoro, kun respekto kiun mi ŝuldas al vi, ke oni ne povas kompari min kun miaj kolegoj. Miaj kolegoj donas nur al la oficejo sian fervoron, sian agemecon, sian inteligentecon kaj sian tempon ; mi vivon mian al ĝi oferas ! (malespere) Ho ! tio ne plu povas daŭri !

La Direktoro (stariĝante). — Estas iom opinio mia.

S-ro Badin (ankaŭ stariĝante). — Ĉu ne ?

La Direktoro. — Nepre. Al mi alportu eksiĝan leteron, mi transdonos ĝin al la Ministro.

Sinjoro Badin (mirigita). — Eksiĝan leteron ? Sed, Sinjor' Direktoro, mi ne intencas eksiĝi ; mi nur petas ke vi pligrandigu mian salajron.

La Direktoro. — Nu ! pligrandigo...

S-ro Badin (ĉe sojlo de l'pordo). — Ja, Sinjoro, vi devas esti justa ! Mi tamen ne povas min mortigi por ducent frankoj ĉiumonate.

(Falas la kurteno)

(tradukis : R. Beck kaj R. Jean)

POR VIA DISTRO

REZULTO DE NIA KONKURSO 1967-68

1) S-ro Enrico Mingo, Napoli (Italujo) : 152 poentoj ;
2) S-ro J. M. Van der Lubbe, Amsterdam : 151 poentoj ;
3) S-ro Captein, Hago, Nederlando : 149 poentoj ;
4) S-ro Dietrich, Beuvrages, 59 : 141 poentoj ;
5) S-ro Ligot, Valenciennes, 59 : 138 poentoj ;
   S-ro Raynaud, Alès, 30 : 138 poentoj ;
7) S-ro Giloteaux, Croix, 59 : 135 poentoj ;
   S-ino M. von Waldowski, Berlin : 135 poentoj ;
9) S-ro Benazet, Argelès-sur-mer, 66 : 132 poentoj ;
10) S-ro Lanz, Romainville, 93 : 127 poentoj ;
    S-ro Salasc, Béziers, 34 : 127 poentoj ;
    S-ino Vincent, Les Andelys, 27 : 127 poentoj.
    k.t.p....

Bedaŭrinde kelkaj partoprenintoj sendis la solvojn nur ek de la dua aŭ tria gazet-numero aŭ ne sendis la lastajn solvojn. La ĉiujara konkurso konsistas el ok problemoj aperantaj en kvar sinsekvaj numeroj de la revuo.

La nova konkurso (1968-1969) komenciĝos en Oktobro 1968.

———

Solvoj de la konkurso-problemoj :

1) Sept-Okt. 1967 :

Unua problemo : Jen la korektitaj frazoj :

1) Pli feliĉa estas donanto *ol* prenanto.
2) Li estas la portreto de *sia* patro.
3) Se vi donas mielon, donu *ankaŭ* kuleron.
4) Malsato *plej* bone gustigas la manĝon.
5) *SEN* laboro ne venas oro.
6) Tempo estas mono. Tempo estas valoro *simila* al oro.
7) Multaj vokitoj, sed ne multaj *elektitoj.*
8) Ju pli da babilado, *des* pli da pekado.
9) Plej bone ridas, kiu *laste* ridas.
10) Ne helpas *spegulo* al malbelulo.

Dua problemo : La trovota frazo estis :
Pli bona estas kalva kapo ol tute nenia.

2) Nov.-Dec. 1967 :

Unua problemo : Jen la korektaj frazoj :

1) Li venas el Parizo (aŭ de Parizo, sed la signifo estas alia).
2) La domo, kies tegmenton mi vidas.
3) Edzino pli elversas *per* funelo, ol edzo enversas *per* sitelo.
4) Mano dekstra ne *sciu, kion* faras la maldekstra.
5) Dorloti serpenton sur *sia* brusto.
6) La laboristo petas la ĉefon pli altigi *lian* salajron.
7) Kio estas bona por vi, estas bona por mi.
8) Kun kiu vi festas, *tia* vi estas.
9) Fremda animo estas abismo sen limo.
10) Por fremda koro ne ekzistas esploro.

Dua problemo : Germanujo estas kreita por vojaĝi tie, Italujo por restadi tie, Anglujo por pensadi tie, Francujo por vivi tie.

3) Januaro-Februaro 1968 :

Unua problemo : Jen la korekta teksto :

« Esperanto, diris elokvente *Edmond* Privat, estas vivanta lingvo de vivanta popolo ». Trafa kaj *tute* vera estas tiu-ĉi formulo. Nia lingvo vivas. Sed *tialke* ĝi vivas, ĝin oni ne *rajtas* konsideri kiel *ian* maŝinon, *kies* diversaj pecoj kaj partoj estas *laŭvole* ŝanĝeblaj aŭ forigeblaj.

« Kun respekto, kun pia respekto, ni devas ĝin trakti ne *nur* ĉar, internacie komuna lingvo, ĝi estas propra apartenaĵo de *neniu* nacio, de neniu eĉ plej lerta, plej scienca personaro aŭ persono, sed ankaŭ *pro* tiu speciala delikateco, kiun ĝi ŝuldas al sia viveco mem ».

Dua problemo : La trovota proverbo estis :
Ripetado estas la patrino de la sciado.

4) Marto-Aprilo 1968 :

Unua problemo : Jen la korektitaj frazoj :

1) Jam la duan fojon estis donita la signalo per la sonorilo.
2) Li tiom laboris, *ke* li estis malsana.
3) *Kio* li fariĝis ?
4) Mi neas, ke tio estas tiel.
5) *Povanta* ripozi, li preferis labori.
6) Inter du potoj staras kaldrono.
7) La urbon *ekkaptinte,* la malamikoj foriris.
8) Li estas senkulpa, kiel infano ĵus naskiĝinta.
9) Oni konfuzas al si la cerbon per miselektitaj legadoj.
10) Tio estas farata, sed ne decas *esti* dirata.

Dua problemo : La trovota proverbo estis :
Bato de patrino ne longe doloras.

———

Amuzaj problemoj

Solvo de la antaŭe aperintaj problemoj

Tramo kaj piedirante : Ĉe la unua renkonto la piediranto marŝis du kilometrojn dum 1/3 da horo (= 20 min.). La tramo veturis :

2 kilometrojn dum 20 — 10 = 10 minutoj. Do rapideco de la tramo : $2 \times 6 = 12$ km. hore.

La piediranto marŝis je la rapido 6 km. hore dum :

$\frac{34}{3} \times \frac{1}{6} = \frac{34}{18}$ de horo inter la du renkontoj.

La tramo veturis dum :

$\frac{34}{18} - \frac{1}{6} = \frac{31}{18}$ da horo., ĉar ĝi restis dum 10 minutoj aŭ 1/6 da horo en B.

De C ĝis B, kaj de B ĝis C, post halto en B ĝi veturis :

$$CB + BD = 12 \times \frac{31}{18} = \frac{62}{3} \text{ kilometrojn.}$$

Estu « x » la kilometra distanco AB :

$$AC = 2 \text{ km.} ; CB = x - 2 ; BD = x - (2 + \frac{34}{3})$$

$$\frac{62}{3} = x - 2 + - (2 + \frac{34}{3})$$

$$2x = \frac{62}{3} + 2 + 2 + \frac{34}{3} = \frac{62}{3} + \frac{12}{3} + \frac{34}{3} = \frac{108}{3} = 36$$


$$x = 18$$

Ĉu vi havas bonajn okulojn ?


La detalo estas nigra punkto. Oni ĝin trovas en la bildoj n° : 2, 4, 6, 8, 10, 12, 14.

GRAMATIKO PER BONHUMORO


« La prefikso « **SEN** » povas esti uzata nur antaŭ substantiva radiko... Por adjektivaj aŭ verbaj radikoj oni uzas la prefiksojn ne aŭ mal laŭ la senco... Oni kutimiĝis almeti « sen » al substantivoj **senpere** derivitaj de verbaj aŭ adjektivaj radikoj. »



— La vetero estas senŝanĝa. Ni atendu !



— Ĉu vi estas senhonta! Vi kredigis min, ke mi dikiĝis.



— Denove haro en la supo ! Ne diru, ke vi estas senkulpa !

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (39 aŭst. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (70 fr.).

Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (12 ŝil.).

Ĉeĥoslovakio : S-ro Dezidero Koronczi, Nabrezie Metoda 1707/16, PRIEDVIDZA (1,50 us. dol.).

Finnlando : S-ro Joel Vilkki, SOMERO 9 - Pĉk : Tu 60253 (7 mk.).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr. 33, - pĉk. Frankfurt (M) 234-759 (5,6 mk.).

Hispanujo : S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1°, la, BARCELONO 90 pes.).

Italujo : Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (840 lir.).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (1260 d.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (5 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Oberst rodes veg. 56, LAMBERTSEDER (10 kr.).

Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (50 zl.).

Rumanio : S-ro Adrian Boldan, p.k. 1412, BUKUREŜTI - 6.

Svedujo : S-ro Roland Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö pĉk. 157007 (8,4 kr.).

Svislando : S-ino H. Chavan, rue Etraz 16, LAUSANNE (7 sv. fr.).

Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO box 1231, BANGKOK (1,50 us. dol.).

Usono : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (1,50 dol.).

Aliaj landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (20 st.) aŭ respondkuponoj (12 respk.), per libroj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al la Direktoro.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier

Le Gérant : P. BABIN.

Supplément au n° 3 - 4 de 1968, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

La lecture du compte-rendu de la réunion du Conseil d'Administration du 7 Juillet vous montrera que la saison 1968 risque, sur le plan financier, d'être médiocre. Les passages de groupes scolaires ou d'amicales qui s'annonçaient assez nombreux n'ont pu, sauf un, avoir lieu. Cet appoint sérieux nous manquera donc cette année. Nous n'avons pas augmenté nos prix depuis plusieurs années or les dépenses fixes et d'alimentation sont en augmentation et l'échéance du remboursement du don Schirber en janvier n'attendra pas. L'année 1969 s'annonce donc assez difficile. Nous devrons limiter nos dépenses à l'extrême. Cependant il y a des transformations à faire. Il apparaît de plus en plus nettement que le nombre de chambres individuelles ou à deux lits est insuffisant alors que des dortoirs restent inoccupés ou le sont, en tant que chambres individuelles, une ou deux personnes occupant un dortoir de six lits. Il nous faut donc transformer des dortoirs en chambres à deux lits. La dépense qui aurait pu être assez facilement couverte en année normale, le sera beaucoup plus difficilement en 1969. Alors nous faisons appel à tous nos amis. Vous qui n'êtes pas encore membres de notre Société Coopérative, joignez-vous à nous en prenant une ou plusieurs parts d'actionnaire. Vous qui êtes déjà membre prenez une ou plusieurs parts supplémentaires. Et je rappelle que notre caisse est largement ouverte aux dons. Non seulement vous permettrez à la Maison de se moderniser et de s'adapter mais encore vous aiderez tout le mouvement esperantiste dont le château de Grésillon est l'un des plus beaux fleurons. Vous vous aiderez vous même car il vous sera alors plus facile de trouver le logement de votre choix lorsque vous voudrez participer à un stage. Nous comptons sur vous tous et vous remercions de la confiance que vous voudrez une fois encore nous accorder.

Pierre BABIN.

Notre administration aurait besoin d'un appareil à polycopier. Si vous en possédez un, en bon état de marche et qui ne vous serve pas, pouvez-vous nous le proposer, à un prix d'ami ? Merci.

LA VIE DE NOTRE REVUE

Un certain nombre d'abonnés n'ont pas encore renouvelé leur abonnement. Nous leur demandons de régulariser leur situation. Cela nous évitera l'envoi de cartes de rappel qui entraîne une perte de temps et d'argent. Nous les remercions tous.

ABONNÉS BIENFAITEURS 1968

Liste nº 5

Mlle	Charrier (Charente-Maritime)	12 F.
M.	Hibon (Hauts-de-Seine)	12 F.
Mlle	Sol (Gironde)	12 F.
M.	Jelenc (Vienne)	12 F.
M.	Flejs (U.R.S.S.)	12 F.
M.	Asao (Japon)	12 F.
Mlle	Berthelot (Loire-Atlantique)	12 F.
Mlle	Robin (Hauts-de-Seine)	12 F.
Mlle	Dardarin (Deux-Sèvres)	12 F.
Mlle	Gitton (Cher)	12 F.
M.	Llech-Walter (Pyrénées-Orientales)	12 F.
M.	Rabineau (Loir-et-Cher)	12 F.
M.	Robin (Maine-et-Loire)	12 F.
Mlle	Davoust (Mayenne)	15 F.
M.	Bruguier (Gard)	12 F.
Mme	Caniot (Deux-Sèvres)	12 F.
M.	Bossard (Loire-Atlantique)	12 F.
M.	Gallet (Isère)	12 F.
Mme	Cuvelier-Delassus (Nord)	12 F.
M.	Hervé (Maine-et-Loire)	12 F.
	Total	**255 F.**

NOS JOIES

Double est notre plaisir de vous annoncer le mariage de :

Marie Leterme avec Jean Thierry, président de la Franca Esperanto-Instituto,

et de Marie-Antoinette Tomialoje avec Gilbert Gerrier, membre de notre Conseil d'Administration.

Tous quatre, très sympathiquement connus de tous les Gresillonnais, ont à des titres divers leur grande part dans la vie active de la Maison. Le Conseil d'Administration et tous leurs amis leur présentent leurs vœux les plus sincères de bonheur.

Réunion du Conseil d'Administration du 7 Juillet 1968

Etaient présents : Mmes Cheverry et Micard, Mlles Levrard et Leterme, MM. Babin, Bodereau, Ciret, Gerrier, Guillaume R. Jacquesson, Jelenc, Dairon, Métivier,

Etaient excusés : MM. Chevalier, Coussé, J.-P. Guillot, P. Jacquesson, Philippeau, Benazet.

La séance est ouverte à 10 h. 10 sous la présidence de M. Babin. Le premier point de l'ordre du jour porte sur les stages de Pâques. La Semaine Culturelle de U.F.E. a réuni une soixantaine de personnes dont seulement six stagiaires parmi les quelque trente jeunes présents. Le nombre de soixante personnes, inférieur à celui des années précédentes s'explique en grande partie par le fait que le Congrès National d'Aix faisait immédiatement suite à cette Semaine Culturelle. Le nombre très réduit de stagiaires de l'U.F.E. et surtout le manque de jeunes étrangers a enlevé à cette période son attrait habituel. M. Jelenc fait part des quelques difficultés qu'il a éprouvées dans la direction de ce stage. Le C.A. souligne que le rôle de la M.C.E. dans une telle période organisée par un autre groupement, est avant tout un rôle d'accueil. Les organisateurs de tels stages doivent se charger de la propagande et de l'encadrement, comme ils s'occupent du programme culturel.

Le deuxième stage de Pâques (Universités Populaires) a lui aussi posé quelques problèmes sans gravité, du fait de la coëxistence des stagiaires U.P. et de quelques esperantistes. Il s'agit là d'une question de bonne volonté et de compréhension de la part des uns et des autres. M. et Mme Ciret sont remerciés pour la manière dont ils ont résolu ces quelques problèmes.

Plusieurs passages étaient prévus pour le mois de Mai et le mois de Juin. Ils n'ont évidemment pas pu avoir lieu ce qui représente une perte financière sérieuse pour la Maison.

La première période de Juillet connait une participation réduite comme les autres années. Une discussion s'engage à ce sujet. Des prositions sont faites pour rendre cette période plus attrayante. Le C.A. aura à établir en Octobre un programme précis tenant compte de ces suggestions en particulier de celle proposant de reprendre les cours de Français par l'Esperanto. M. Moulin qui devait guider le 1er cours pendant cette période étant dans l'impossibilité de venir pour cause de maladie, Mme Vincent a gentiment accepté de le remplacer au pied levé. Le C.A. la remercie de son aide.

La deuxième période sera assez fréquentée mais surtout pendant la première semaine, le Seminario de U.E.A. se réduisant en fin de compte à une semaine. La seconde partie sera consacrée à des conférences et à des excursions.

La troisième période s'annonce convenable et il y a

déjà des inscriptions pour la quatrième. Mais une évolution constatée pendant les dernières années devient plus sensible cette année : les chambres particulières et familiales sont de plus en plus demandées et les dortoirs restent déserts. Il faudra donc envisager la transformation de dortoirs en chambres à deux lits...

Il est ensuite discuté de problèmes divers. M. Bodereau est prêt à mettre en route sa campagne de propagande pour la Maison telle qu'il la définie au C.A. au mois de mars. En plus de la somme de départ qui lui a été allouée, le C.A. accepte à la demande de M. Bodereau de lui consentir une ristourne sur les cours par correspondance (20 %) et sur les livres (10-15 %) qu'il pourra placer, afin de financer la suite de cette campagne. M. Bodereau agira au nom d'une société, « M.C.E. Informations » dont les statuts vont être déposés.

Le C.A. répond négativement à une demande qui lui est faite de cession, pour un cours oral, des feuillets du cours 2e degré. Ce cours est essentiellement un cours par correspondance et il n'est pas souhaitable de le détourner de sa destination. Est également repoussée la proposition d'un esperantiste de faire à Grésillon un Centre de rattrapage scolaire pour adultes, la chose étant pratiquement irréalisable.

M. Babin explique pourquoi le numéro 3-4 de Kulturaj Kajeroj paraîtra avec un certain retard. Ce retard est dû au évènements qui n'ont permis ni la rédaction ni l'impression en temps voulu. Il présente le « nouveau né » des éditions de la Maison. Il s'agit d'une brochure présentée sous une couverture originale executée par Mme Lilli Giloteaux, et dont le titre est : « Naskiĝo de Esperanto-Domo ». Cette brochure vendue 3,50 F. retrace, à l'aide des documents que Micard possédait, la création de la Maison Culturelle Esperantiste et les 16 premières années de la vie de Grésillon. Elle devrait intéresser tous les amis de la Maison et aussi ceux qui ne la connaissent pas très bien encore.

Enfin le C.A. constate le gros travail exécuté par M. Gerrier pour la remise à neuf du dortoir 17 et du couloir du premier étage et le remercie d'avoir consacré tant de week-ends à ce travail.

L'ordre du jour étant épuisé, la séance est levée à 12 h. 45.

Le secrétaire de séance,
JELENC.

Konsilia Kunveno de la 7-a de Julio 1968

Resumo de la protokolo

Estas unue ekzamenitaj la rezultoj de la Paska Kultura Semajno organizita de U.F.E. Sesdek personoj ĉeestis el kiuj nur ses stipendiuloj. Tiun bedaŭrindan fakton klarigas manko de taŭga propagando ĉefe eksterlande. La Nacia kongreso en Aix, kiu okazis tuj post tiu Semajno, malebligis la venon de pluraj personoj al Gresillon. La konsilio insistas pri la fakto, ke kiam temas pri studperiodo organizita de alia asocio, Gresillon ĉefe rolas kiel gastigejo. Propagando apud la gejunuloj kaj programo estas afero de la organizantoj. Dum la dua parto de la Paskaj ferioj okazis kunveno de la Popolaj Universitatoj kun kvindek partoprenantoj. Bona sukceso.

Pro la sociaj eventoj en majo la diversaj neesperantistaj grupoj, kiuj petis gastigadon en Gresillon ne povis veni. Tio certe sentiĝos en la Gresillona kaso.

La unua somera periodo estas nek pli nek malpli sukcesa ol la antaŭajn jarojn. Proponoj estas faritaj por revigligi tiun periodon. La konsilio devos atente studi tiujn proponojn okaze de sia kunveno en oktobro.

La dua periodo estos sufiĉe sukcesa nur dum la unua semajno (Seminario de U.E.A.). Pro la mallongigo de la programo de U.E.A. la Esperanto-Domo estis devigata organizi specialan programon por la dua semajno. Aŭgusto verŝajne konos la kutiman sukceson kun partopreno de pli da eksterlandanoj. Jam aliĝoj venis por la kvara periodo.

Montriĝas ke eĉ la gejunuloj pli kaj pli preferas loĝadon en apartaj ĉambroj. La rezulto estas, ke komunaj ĉambroj (6 - 7 litoj) estas okupataj de unu aŭ du personoj. La konsilio decidas konstrui dulitajn ĉambrojn el la komunaj ĉambroj. Sed ĉar la financa rezulto de la jaro 1968 ne estos tre bona, estus necese, ke oni varbu novajn akciulojn aŭ ke la membroj aĉetu novajn akciojn. La konsilio memorigas, ke la kaso estas larĝe malfermita al la donacemuloj.

Mankas en la Esperanto-Domo multobligilo por cirkuleroj. Se iu samideano posedas tian aparaton en bona stato, kaj senutila al li, li bonvolu fari al ni proponon pri prezo. Antaŭdankon.

Vient de paraître !

« NASKIĜO DE ESPERANTO-DOMO »

La création de la Maison Culturelle
et 16 ans de fonctionnement
à Grésillon.

Nombreuses illustrations.

Couverture originale de Lilli Giloteaux

3,50 F. A NOTRE LIBRO-SERVO

SERVICE - LIBRAIRIE

Adresser votre commande et votre chèque de paiement au nom de : M.C.E. 1485-39 Nantes, à :

M. GUILLOT, lotissement Deshoullières, route de Limoges, 86 - POITIERS

Nos prix sont indiqués franco de port à partir de 5 F.

LIVRES D'ETUDE

Esperanto manuel, par Warnier	8,00
Esperanto por infanoj	3,00
Junulkurso par S.A.T. amikaro	7,00
Ni parolu en esperanto, de A. Ribot	5,00
Por la praktikantoj, de P. Babin	8,50

DICTIONNAIRES

Vocabulaire de poche, de Bastien	3,30
Dictionnaire pratique (S.A.T.)	13,80
Dictionnaire Français-Esperanto, de Léger et Albault	22,00
Grand dictionnaire Esperanto-Français, de Waringhien	34,50
Plena vortaro, par S.A.T.	17,00

DISQUES

Tra la mondo : 6 disques, 7 livrets, 1 Précis grammatical de A. Ribot, le tout	86,70
6 disques seuls	42,00
7 livrets seuls	48,00
Junul - Kurso - 5 diskoj por kompletigi la lerno-libron	12,00

LIVRES POUR ENFANTS

1 livre	1,12
La série de 10 livres	10,00

HISTOIRE DE LA LANGUE ET DU MOUVEMENT

Lexique fondamental, par Léger		6,50
Aventuroj de pioniro, de E. Privat		9,00
Dialekto dialektiko, de Dalmaù		4,00
Esperanto, fil d'Ariane, de P. Delaire		12,50
Fundamento de Esperanto	rel.	18,20
	bro.	13,70
Fundamenta krestomatio		17,50
Historio de la lingvo esperanto, de E. Privat		10,50
Lingvo kaj vivo, de Waringhien		20,00
Lingvaj respondoj, de L.L. Zamenhof	rel.	11,00
	bro.	8,20
Planlingvaj problemoj, de W. Gilbert		6,00
Proverbaro esperanta		8,00
La zamenhofa esperanto		20,00
Le Docteur Esperanto, de Maria Ziolkowska	rel.	14,10
	bro.	6,95
Retoriko de Lapenna		17,00
Vivo de Zamenhof, de E. Privat		8,00
Zamenhof, aùtoro de Esperanto, de M. Boulton		17,00
Vindianıa, notre patrie préhistorique retrouvée par Petro Stojan		1,00

ROMANS

Bill kaj Lazuraj okuloj aŭ du kuleretoj da ĉielo de Atus Goldoni. Lina Gabrielli		4,50
La eta princo, de A. de Saint-Exupéry		13,00
Fabeloj de Andersen		15,00
Frisaj rakontoj en esperanto de diversaj aŭtoroj		9,50
Homoj kaj riveroj, de J.H. Rosbach		9.50
Homoj sur la tero de S. Engholm	bro.	12,00
	rel.	16,00
Infanoj en Torento, de S. Engholm (2 vol.)		4,50
Kiel akvo de l'rivero, de R. Schwartz		17,00
Koloroj, de Julio Baghy		4,00
La kombilo de Lina Gabrielli		4,50
Kredu min, Sinjorino, de C. Rossetti		10,00
Malsata ŝtono, de R. Tagore		13,00
La marvirineto, de Andersen		12,00
Tiel okazis aù Mistero minora, de F. Szilagyi		9,50
La naùzo, de J.-P. Sartre	rel.	20,50
	bro.	17,50
Normandaj rakontoj, de Maupassant		18,00
Quo vadis, de H. Sienkiewicz		12,00
Sen eliro et La respektema p..., de Sartre		8,60
Specimene, de H. Beaupierre		8,00
Taglibro, de A. Frank		11 00
33 rakontoj. La esperanta novelarto		17,00
La verda raketo, de Jean Forge		12,00
Vivo kaj opinioj, de Majstro M'saud, de Jean Robillard		7,50
Novaj vestoj de la imperiestro de Andersen		12,00
Maŝinmondo de Szathmari		7,50
Sen paraŝuto de Poul Thorsen		6,00
Sub stelo rigida de Porsteinn Fra Hamri		6,00

Et de nombreux autres ouvrages non mentionnés

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 30,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

Maison Culturelle Espérantiste

Renseignements :

Château de Grésillon

49 - BAUGÉ

Tél. 34

ESPERANTISTA KULTURDOMO

(Fondinto : H. Micard)

Kastelo Gresillon
49 - BAUGÉ
FRANCUJO

Kulturaj Arangoj 1968

PASKAJ FERIOJ

(Alventago : **4-an de Aprilo** — Forirtago : **11-an de Aprilo**)

Sesa Kultura Semajno

organizita de U.F.E. kaj G.E.E.

PROGRAMO :

Pliprofundigo de la lingvokonoj per teksto ; pedagogia iniciado al instruo de la lingvo ; kultura kaj arta aplikado de la lingvo ; prelegoj.

EKSKURSO : la 7-an de Aprilo.

De Pasko ĝis la fino de Julio estos eble akcepti grupojn eĉ ne-esperantistajn por pli malpli longaj periodoj.

SOMERA PROGRAMO

Unua Periodo

Alveno : **30-an de Junio** — Foriro : **21-an de Julio**

Esperantaj Studoj

Gvidado : A. RIBOT

Kurso por komencantoj ; praktika kurso ; supera kurso.

EKSKURSOJ organizeblaj : (vidu « Dua Periodo »).

Dua Periodo

Alveno : **22-an de Julio** — Foriro : **1-an de Aŭgusto**
(estos eble alveni la 21-an kaj foriri la 3-an)

Internaciaj Turismaj kaj Kulturaj Ferioj

SEMINARIO

organizita de U.E.A.

pri la temo « Modernaj Formoj de Laboro en la Nuntempa Esperanto-Movado »

Partoprenos prof. d-ro **Ivo Lapenna** kaj aliaj plej kompetentaj respondeculoj sur diversaj kampoj de aktiveco en Esperanto-movado.

Gvidanto : D-ro Peter Zlatnar, Rimska 7, LJUBLJANA

Detala programo havebla en Januaro.

EKSKURSOJ : Loire-kasteloj (25 F.), urbo Nantes (30 F.), urbo Le Mans (20 F.), urbo La Flèche (12 F.).

GRANDA RALIO organizita de E.K.D.

Tria Periodo

Alveno : **4-an de Aŭgusto** — Foriro : **25-an de Aŭgusto**

KULTURAJ ESPERANTISTAJ SEMAJNOJ

Dimanĉon la 4-an (21 h.) : Interkona vespero.

De la 5-a ĝis la 23-a : ĉiutage :

9 h. 30 - 11 h. 30 : **Esperanto-kursoj.**
Porkomencanta kurso.
Praktika kurso.
Supera kurso.

14 h. - 16 h. : Bindado, korbofarado

18 h. - 19 h. : Konversacio.

21 heures : Paroladetoj, filmoj, kantoj.

Sabaton la 24-an :

Ekzamenoj : Atesto pri Lernado, Atesto pri Supera Lernado, Atesto pri Kapableco, Pedagogia Atesto.

Dimanĉoj 11-a kaj 18-a estos liberaj.

Ekskursoj : Vidu « Dua Periodo ».

Kvara Periodo

Alveno : **25-an de Aŭgusto** — Foriro : **8-an de Septembro**

STUDPERIODO organizita de U. F. E.

PORKOMENCANTA KAJ PRAKTIKA KURSOJ

Ĉiutage :

9 h. - 11 h. : Gramatiko-leciono.

11 h. - 12 h. : Konversacio.

16 h. - 17 h. 30 : Studo de teksto.

17 h. 30 - 18 h. 30 : Ludoj en Esperanto.

21 h. : Ludoj, kantoj, filmoj, paroladetoj.

Sabaton 7-an : Ekzamenoj.

Ekskursoj : Vidu « Dua Periodo ».

De la 8-a ĝis la 15-a de Septembro la kastelo estos malfermita por ripoz-periodo se la nombro de aliĝintoj estos sufiĉe granda.

Bonvolu rezervi viajn ĉambrojn sufiĉe frue

INFORMOJ KAJ ALIĜOJ :

ESPERANTISTA KULTURDOMO Kastelo Gresillon, 49 - BAUGÉ

Ne forgesu, ke la revuo « Kulturaj Kajeroj » informos vin pri la vivo en Grésillon. Provnumero kontraŭ respondkupono.

IMP. COCONNIER, SABLÉ